

Basyoo

Vizito al la sanktejo Kasima

(Tradukis el japana lingvo Teruhiro Sasaki)

Oni diras, ke Teisitu, poeto el Kioto, versis sekvan poemon, irinte al golfo Suma por vidi lunon:

Ombro de pinarboj,

Luno de 15-a nokto,

Rememorigas

Ekzilitan ĉi tien Tyuunagon

[Matu kage ya tuki wa san go ya Tyuunagon]

Mi, frenezulo, ankaŭ sopirante je antikvon, decidis ĉi aŭtune vidi lunon super la sankta monto en Kasima. Akompanis min du homoj, senmastra samurai [Sora] kaj migra bonzo [Souha]. La bonzo vestis sin en nigra robo kvazaŭ korvo, pendigis ĉe si de kolo almozakon, adorante portas sur sia dorso tabernaklon kun budha bildo de lia elirado el monto, sonorigante bastonon, trairinte sen iu ajn obstaklo tra Senporda Bariero, piediras memstare laŭ tero sub ĉielo. Mi mem, nek bonzo, nek laiko, kvazaŭ vesperto inter birdo kaj muso, por transiri al la insulo sen birdoj, enŝipiĝis apud la pordo de mia domo kaj atingis la lokon, nomatan Gyoutoku.

Elŝipiĝinte, mi ne rajdis sur ĉevalo, volis provi mian forton de malgrasa suro, do mi iris piede. Ĉiuj portas ĉapel-ombrelojn el kamecipariso, kiujn iu homo akiris de la provinco Kai, do ornamite per ĝi, trairis la vilaĝon Yahata kaj poste trovis sin sur granda kamparo, nomata Kamagai-no-hara. En ĉina esprimo estas dirite “panoramo de Sinden je mil leŭgoj”, tiel same ĉi tie videblas per okuloj plej malproksima horizonto. La monto Tukuba staras alta lontane kun siaj du pintoj. Mi aŭdas, ke ankaŭ en Ĉinio estas la monto Lushan, havanta duopan glaviforman pinton.

Ne necesas diri

Pri beleco en neĝo,

Nun mirinda estas

Purpura Tukuba

[Yuki wa mousazu mazu murasaki no Tukuba kana]

Tio estas la poemo de Ransetu, mia disĉiplo. Antaŭ ĉio ĉi tiu monto estis eternigita en la vorto de Princo Yamato Takeru, do konsiderita de poetoj de Rengao [ĉeno de poemoj] kiel la origino de tiu ĝenro, kaj fariĝis ĝia alinomo. [“Vojo de Tukuba” mem signifas rengaon.] Oni ne povas preterpasi tie sen utao aŭ sen hajko. Vere, aminda estas la figuro de monto.

Lespedezo ĉi tie estas simila al brokaĵo sternita sur tero, tial do iam guberniestro Tatibana Tamenaga enmetis lespedezon en grandan komodon kaj sendis ĝin al ĉefurbo kiel donacon. Tia speco de estetika gusto estas ankaŭ admirinda. Floras platikodonoj, patrinioj kaj kreskas [themedaoj] kaj miskantoj, ĉiuj miksiĝas senorde ĉi tie, plie vircervoj krias, sopirante inojn. Tio estas tre impresa. Herdo da paŝtataj ĉevaloj fiere vagadas kvazaŭ kontentaj je naturo, tio ankaŭ estas pitoreska.

Kiam krepuskiĝas jam, ni atingis la lokon, nomatan Husa, ĉe la bordo de la rivero Tone. Loĝas ĉi tie unu fiŝisto, kiu instalas grandan nason por kapti salmojn en la rivero kaj vendas ilin sur la bazaro de Edo. Vespere ni eniris en lian domon kaj ripozis. Nokte en la gastejo fiodoras je fiŝo. Luno lumas plene, do ni ekveturis per nokta boato kaj atingis la urbon Kasima.

Ekde tagmezo pluvegas senĉese, oni tute ne povas esperi spekti lunon. Mi aŭdis, ke ĉe la montpiedo vivas antaŭa bonzo [majstro Buttyoo] de la templo Konpon-zi, kiu nun eskapis de la mondo kaj loĝas ĉi tie, tial do ni vizitis lin kaj tranoktis ĉe li. Kiel [ĉina poeto, Tufu,] versis, “Oni ege inspiras al homo profundan sinesploron”, tiel ŝajnas al mi, ke mi ĉe li atingis dume puran spiriton.

La aŭrola ĉielo dum elkrepuskiĝo iomete sereniĝas, kaj la bonzo vekigis nin por surprizi, do ni ellitiĝis. Lunlumo, sono de pluvo, tuta mirinda pejzaĝo nur tiel plenigis al ni koron, ke ni havas neniun vorton por diri. Estus tre domaĝe, se ni ne povus versi poezion, veninte malproksime por vidi lunon. Antaŭe eĉ iu virino [Sei Shounagon] bedaŭris, ke ŝi ne povis versi pri kukolo kaj revenis hejmen sen poezio. Tio estas bona helpo al mi.

Ne ŝanĝas la ĉiela luno mem,
Sed ĝia bildo ŝanĝas,
Dependante de nuboj.

Bonzo [Buttyoo]

[Oriori ni kawaranu sura no tuki kage mo
tizi no nagame wa kumo no mani mani]

Luno rapidas,

Branĉoj havas pluvon

Tousei [Basyoo]

[Tuki hayasi kozue wa ame wa moti nagara]

Tranoktante en templo,

Mi kun serioza vizaĝo

Spektas lunon

Tousei

[Tera ni nete makoto gao naru tukimi kana]

Kiel bambuo,

Kuŝinte dum la pluvo, restaras,

Ni spektas lunon

Sora

[Ame ni nete take oki kaeru tukimi kana]

Luno tristas,

El antaŭtegmento de halo

Faladas gutoj de pluvo

Souha

[Tuki sabisi dou no nokiba no ama sizuku]

Antaŭ la altaro de sanktejo Kasima

Ĉi pino burĝonis

En la tempo de dioj,

Ho, sankta aŭtuno

Tousei

[Kono matu no mibae sesi yo ya kami no aki]

Mi volus deviŝi gutojn sur musko

De la sankta ŝtono

Kien dio malsupreniĝis

Souha

[Nuguwabaya isi no omasi no koke no tuyu]

Surgenue sidante,
Krias cervoj humile,
Per respektplena voĉo

Sora

[Hiza oru ya kasikomari naku sika no koe]

Ĉe vilaĝdomo

Duone rikoltata rizkampo,
Gruoj,
Aŭtuno en vilaĝo

Tousei

[Karikake si tazura no turu ya sato no aki]

Por rikolti nokte en rizkampo
Oni dungus min,
Luno sur vilaĝo

Souha

[Yoda kari ni ware ya towaren sato no tuki]

Eĉ farmistido, senŝeliganta rizon,
Paŭzas dume,
Lunon rigardas.

Tousei

[Sizu no ko ya ine surikakete tuki wo miru]

Folioj de kolokasio
Sur bruligita kampo,
En la vilaĝo, kie mi atendas lunon

Tousei

[Imo no ha ya tuki matu sato no yakebatake]

Sur kampo

Pantalono
Ŝimilita per lespedezo,

Tinkturado de unu floreto

Sora

[Momohiki ya hitohana zuri no hagi goromo]

Aŭtuno de floroj,

Paŝtataj ĉevaloj

Saturitaj per herbomangâjo

Sora

[Hana no aki kusa ni kui aku nouma kana]

Kampo de lespedezo,

Lasu al lupo loĝi ĉi tie

Almenaŭ unu nokton

Tousei

[Hagi hara ya hitoyo wa yadose yama no inu]

Sur revena vojo mi loĝis ĉe s-ro Zizyun

Nestu ĉe mi

En loĝejo, sekiginta pajlon,

Amikoj-paseroj

Mastro

[Negura seyo wara hosu yado no tomo suzume]

Kun espero al aŭtuno,

Stikita

Kriptomeria heĝo

Gasto

[Aki wo kometaru kune no sasi sugi]

Por vidi lunon

Oni ankris boaton,

Supren tiratan kontraŭ fluo

Sora

[Tuki minto sio hiki noboru hune tomete]

Kvara jaro de Zyookyoo, 25-a tago de oka monato [1687]